# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"

Jarabono: FF I5,oo
CCP 956-28 P Montpellier

4a kvaronjaro-N° 9I
I984

BONE -
Generale venis pozitivaj komentoj pri la aspekto de la nova SFS. Restis kelkaj eraroj en la lasta numero, sed tiu-ĉi fojon ni kontrolis dufoje kaj la grumblemuloj devos rezigni (esperelle)!
Dankon al tiuj, kiuj kunlaboris, sendante rimarkojn, raportojn, artikolojn, tajpante, kontrolante, ekspedante, ktp...
Longe ni atendis provizojn por tiu-ĉi numero. Fine alvenis tro multaj bulteneroj! Ni pardonpetas de tiuj, kies kontribuoj ne aperos. Apartan dankon al nia amiko Valo, kies "Letero el Nimo" fariĝos regula trajto de nia bulteno.
Dank'al la kontribuintoj, ni povas antaŭvidi la venontan SFS kun 8 paĝoj.Pluraj samideanoj konsciis, ke SFS bezonas abonojn kaj jam pagis la abonon por 85. Vidu vian situacion sur la sekvanta paĝo. Kun bedaŭro, ni devos forgesi tiujn, kiuj forgesos SFS! La grupoj Béziers kaj Nimes okupiĝis pri niaj aranĝoj en 85: fruaj aliĝoj al la staĝo kaj al la federacia kongreso helpos ilin.
Niaj federacianoj ankaŭ partoprenis en la apudaj renkontiĝoj (18 Esperantistoj el Perpignan al la Kataluna Kongreso de Olot (Hispanio), 7 al la Rodana Rendevuo en Avignon, pluraj al la staĝo de Lyon...)
Ili eĉ ne forgesis raporti por la federacio... Malpli kontentiga, venis nur 2 raportoj de grupoj pri la jara agado...

---

"Esperanto" de Novembro mencias pedagogian eksperimenton en Bulgario, kie la Internacia Lingvo estas oficiale kaj devige instruata en pluraj mezlernejoj. "Se la eksperimento sukcesos, ekzistos probableco enkonduki devigan lernadon de Eo ankaŭ en aliajn bulgarajn mezlernejojn, kaj post preparo de kvalifikitaj instruistoj eventuale en ĉiujn mezlernejojn, kio egalvalorus oficialigon de la I.L. en Bulgario". Cu la dua lando post Hungario? Kial ne esperi je la sojlo de nova jaro al novaj atingoj.
Cio dependas de nia agado. Konklude, permesu al mi ŝteli vortludon de "Laŭte" alvokante al la pasivuloj: Ellitiĝu kaj elitiĝu!

J. Hénin

La N° 92 de SFS aperos fine de marto. Limdato por la artikoloj : 10a de Marto. Informojn, helpon vi povas ricevi de la sekvantaj personoj. Reciproke informu kaj helpu ilin:

| | | | |
|---|---|---|---|
| AUDE: | Carcassonne: | C. Borque 6,Rue Pablo Neruda 11000/ tél. | (68)25 45 13 |
| | Narbonne | M. Deligne 30, Rue Paul Ramadier 11100 Narbonne | 32 20 62 |
| GARD: | Alès: | R. Pelletier, Mas du Rieusset 30480 Cendras (li havas telefonon n°?) | |
| | Le Cailar: | L. Angevin 30470 Le Cailar | |
| | Nîmes: | G. Soulier. 213,Avenue de Camargue 30132 Caissargues | (66)38 10 73 |
| HERAULT: | Béziers: | S. Authier 9,Rue G. Picot 34500 Béziers | (67) 32 13 18 |
| | | F. Terral 17,Rue Gratiolet " " | 31 13 46 |
| | Lunel: | L. Négron 40,Chemin des Amandiers 34400 | 71-05-79 |
| | Montpellier: | A.Capus 15 rue des Frères Platter 34000 | 63-15-21 |
| | | Y. Vierne. 5,Rue du Docteur Roux 34000 | 54 15 43 |
| LOZERE | La Canourgue: | J.J. Hénin Beauregard Rte de Montcayroux 48500 | (66) 32 86 36 |
| PYRENEES-ORIENTALES | | | |
| | Perpignan | J. Amouroux -Moulin à vent-1 Rue de Sorède 66000/ | (68)67 41 27 |
| | | R.Llech-Walter 72,Avenue de Gal de Gaule 66000/ | 34 54 38 |

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

La doloriga paĝo: financoj,abonoj,kotizoj...

Konsilo de la kasistino: La federacio ne peras abonon, krom por la federacia bulteno.
Kiam vi sendas monon (abono al SFS (15F),donaco...), ne forgesu
mencii la kialon de via sendo kaj vian adreson

Nur uzu la jenan adreson: Fédération du Languedoc-Roussillon pour l'Esperanto
CCP 956-28 P Montpellier
ĉe S-ino Négron 40,Chemin des Amandiers 34400 Lunel

Koncerne SFS, krom eraro O via situacio estas en ordo por 1985,Dankon!
X ni esperas vian reabonon (vidu supre)
O vi ricevas specimenon senpagan; se vi interesiĝas,vidu supre
O vi ne pagis vian abonon por 1984 kaj eble ne plu ricevos SFS...
...krom se vi pagos abonon por 1985!

Kotizoj GARD: (de Oktobro 84 ĝis Oktobro 85)
-Federacio "Gard" ..........5F
-Abono "Sud Francia stelo",minimume:15F

La izolitaj samideanoj bonvolos pagi pere de
CCP Fédération du Gard pour l'Esperanto CCP 1857 07 Montpellier
La membroj de la grupoj en Nimes kaj Alès aldonos 10F por siaj propraj grupoj
kaj pagos pere de: Cercle Culturel Esperantiste Nîmes CCP 1665 10 K Montpellier
aù Groupe Esperantiste "La Verda Stelo" CCP 836 52 X Montpellier

Kotizoj UFE-UEA (vi ricevis rektan alvokon de UFE)
UFE: simpla membro 65F/ aktiva membro 170F (paro 250F) JEFO:Kiel UFE (patrona membro 65F)
UEA: Membro kun jarlibro:76F Membro Abonanto (Jarlibro+ revuo Esperanto):190F

Abonoj: Jen kelkaj tarifoj; la listo ne estas kompleta.
Pri aliaj gazetoj,revuoj,kontaktu nin.
El Popola Ĉinio :60F (1 jaro) 100F (2jar.) 144F (3j.)
Esperanto: 114F Heroldo: 90F Jarlibro de UEA:76F Kontakto:57F
Kulturaj Kajeroj:60F Laùte: 25F Literatura Foiro:80F
Monato: 150F (165F kun kalendaro) Ovo: 100F

La datoj de la Nacia kongreso de UFE estas konfirmitaj: de la 5a ĝis 9a de Aprilo en Angers
La Universala Kongreso okazos en Augsburg de la 3a ĝis la 10a de aùgusto 85
Se vi intencas partopreni jen la tarifoj en guldenoj:

| | membro de UEA | (kunulo) | ne membro de UEA | (kunulo) |
|---|---|---|---|---|
| -ĝis 31a de Decembro | 125 | 62 | 156 | 94 |
| -ĝis la 14a de Majo 85 | 156 | 94 | 188 | 125 |
| -poste | 188 | 125 | 219 | 156 |

UFE organizos "trajnon" al Aùgsburg (el Parizo)
Prezoj de la ĉambroj en Aùgsburg (en Markoj) unulita: 30/40 markoj ĝis 105/155
dulita: de 45/65 " 170/205

Universala Kongreso en Pekino (26 VII -2 VIII 86)
Speciala tarifo ĝis la 31a de decembro 84: membro de UEA 112 gd (kunulo 56)
ne membro 140 84

Esperanto-Domo Grésillon 49150 Baugé
31 III- 6 IV: Internacia renkonto de infanoj-kursoj,diskutrondo pri lingvo-instruado
16 VI 30 VI: neformala internacia Renkonto -programo fiksota surloke
30 VI- 21 VI: prelegoj kaj kursoj
22 VII-11 VIII Kursoj
11 VII-24 VIII: Informatiko per/por Esperanto. Iniciado kaj praktiko
18 VIII-1 IX: Renkonto de blindaj kaj ne-blindaj Esperantistoj.Trejnado al tradukado(J.Gonin)
Ni povas informi vin pri la tarifo (taga prezo kun unpersona ĉambro 130f,ankaù ĉambroj
por familioj,komunaj ĉambroj,oni eĉ povas tendumi)

NIAJ ARANĜOJ en 1985

FEDERACIA KONGRESO en NÎMES, SABATON la 4an kaj DIMANĈON la 5an
(detaloj en la sekvanta SFS)

LINGVOSTAĜO apud BEZIERS de ĴAUDO la 16a ĝis DIMANĈO la 19a de majo 1985
(detaloj kaj aliĝilo ĉi-sube)

ESPERANTISTA SEMAJNO en SÈTE de la 15a ĝis la 22a de septembro 1985

---

La lingvostaĝo (kiu,ŝajne,fariĝas kutima) okazos tiun-ĉi jaron en "Les Sablières", malnova langvedoka bieno de la lasta jarcento. Gi konsistas en du domoj apartigitaj de interna korto, meze de arbara parko. Situanta apud la enfluejo de Aude,je 15km de Béziers,5km de Valras kaj 300m de la maro,"Les Sablières" prezentiĝas kiel taŭga "laborejo". Ĉiuj povos manĝi kaj dormi surloke;la dormoĉambroj entenas 3 aŭ 4 litojn. Oni devas kalkuli 360F por la tuta restado (loĝado kaj tri manĝoj),+/-10% laŭ la nombro da partoprenantoj. Pro tio,estus bone,ke multaj aliĝu kiel eble plej baldaŭ (en januaro kaj februaro se eble).
Ni esperas starigi 3 kursojn inter ili unu por iniciado (veraj komencantoj).
Ni alvokas al la kapabluloj por gvidi kurson kaj al ĉiuj por kontribui al la programo.
Por alfronti la diversajn elspezojn,ni petas de la partoprenantoj aliĝkotizon de 20F
Sendu la aliĝilon kaj monon al Cercle Biterrois d'Esperanto,9 rue Georges Picot 34500 Béziers CCP Montpellier 1606 29 T. Por informoj,
telefonu al la numero (67) 31 13 18. Ni esperas vian partoprenon.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Aliĝilo: Nomo(nom) Persona nomo(prénom)
Adreso:

Loĝado: Mi partoprenos la tutan staĝon (je participerai au stage complet) Jes(oui)Ne

Mi alvenos la ........je la .....h, kaj foriros la........je.....h

J'arriverai le à h, et partirai le à h

kurso: je suis tout à fait débutant.

mia nivelo estas..................,mi povas kontribui per.................

Ekzameno: mi deziras trapasi: .......................

Rimarkoj: ......................................

Mi pagas aliĝkotizon de 20F al Cercle Biterrois d'Esperanto, 9 rue G. Picot Béziers

Je joins à mon adhésion un chèque de 20F à ..............................

CCP 1606-29 T Montpellier

---

Vivo de la Grupoj - CARCASSONNE- Nia agema samideano, Cesaro BORQUE, nun delegito de UEA (gratulojn) provis plurfoje "lanĉi" Esperanton en Carcassonne pere de inform-kunveno kun diapozitivoj,ekspozicio kaj longa intervjuo kun foto en "L'Indépendant" La rezultato ne respondas malfeliĉe al la iniciatoj. Ni semu kaj semu konstante.

Esperanta Muzeo en Katalunio (el "Kataluna Esperantisto" de Septembro 84)
Ci-tiu Esperanto-Muzeo estas la plej grava privata muzeo de Esperanto en la tuta Eŭropo, ĝi fermiĝis iom post iom dank'al la persisto kaj sindonemo de la loka apotek-isto Lluis Ma Hernandez i Yzal. La muzeo fondiĝis en 1968,sed en 1974 la fondinto situigis ĝin en apartan domon,kie ĝi okupas tutan etaĝon.
La Esperanto-Muzeo estas unu el la plej gravaj trezoroj de la esperanta movado; ĝi enhavas 2300 kompletajn jarkolektojn de malsamaj periodaĵoj,2600 librojn,1000 turismajn prospektojn kaj diskojn,afiŝojn,poŝtkartojn,eĉ valorajn manuskriptojn (Zamenhof,Stojan kaj aliaj). La fondinto diris,ke li sentos sin feliĉa se la Muzeo utilos al la esperanta movado; cele al tio li pretigis studĉambron por ke ĉiu stud-ema esperantisto, historiisto,esperantologo,povu uzi plej komforte tian trezoron. Verŝajne oni povas diri ke la konkluda devizo estis: "Esperantistoj profitu de la Esperanto-Muzeo".
(Tiu muzeo troviĝas en San Pau d'Ordal, apud Barcelono)

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Raporto pri la 20a Kataluna Kongreso de Esperanto (Katalunio/Hispanio)
La Kongreso de la katalunoj okazinta en Olot de la 12a ĝis la 14a de oktobro 1984 atingis rekordan partoprenon de entute 205 gekongresanoj, inter ili 20 eksterlandanoj el Belgujo,Francujo,Italujo,Nederlando,Rumanujo,Pollando kaj Usono (vizitis ĝin la 14an,grupo de 18 esperantistoj el Perpignan)
Elstaris la afabla akcepto de la kongresanoj en la Urbodomo, kie la urbestro bonvenigis ilin per sufiĉe longa saluto en Esperanto, la inaŭguro de nova Avenuo laŭ la nomo de D-ro Zamenhof, la solena ceremonio de la 24-aj Internaciaj Floraj Ludoj kun la brila festparolado de D-ro André Albault,Prezidanto de la Akademio de Esperanto, kaj la itala poeto Giorgio Silfer.
Menciindaj estas la Internacia kurso je du niveloj kaj la teatraĵo "Dum ajna sunmateno" ludata de kataluna trupo, la speciala kontribuo de la pola kantistino Marta Podgörska kaj la publika prezento de la libro "Esperanto en Olot".
La kongresa temo: Ameriko, alia etnocido! estis pritraktita de tri laborgrupoj. Specialan poŝtstampon oni uzis dum la kongreso kaj bone provizita libroservo funkciis ankaŭ. La kongresa flago estis transdonata al la venontjara kongresurbo


--------------------

Raporto pri la staĝo Librotenado kaj administrado
Ĝi okazis en Liono la 20an kaj 21an de Oktobro. Ĝi estis organizita administracie de UFE kaj materiale de la Esperanta-Centro de Liono. Dudek delegitoj ĉeestis,el Grenoble,Nice,Perpignan,Paris (NDLR: pluraj el nia federacio ĉeestis)
S-ino Triolle klarigis: Kiel ekzisti oficiale: kreo de kultura centro,elekto de la estraro,protokolaro kaj deklaracio al la Prefektejo por la oficiala agnosko, maniero por sendi kunvokilojn,ktp; rilato inter la kultura centro kaj federacioj kaj UFE. Desegnaĵoj sur tabulo pli komprenigis ĉeestantojn. Ŝi ankaŭ klarigis la manieron por kontakti Urbestron,Deputiton,Senatanon.
S-ro Maurin klarigis: kiel aranĝi ĝeneralan kunvenon: aktiveca raporto,financa raporto,elekto de la komitato. Dimanĉon S-ro Rousseau parolis pri la librotenado: enspezoj,debeto,kredito kaj budĝeto, kiamaniere orde skribi la kontojn en librotenado; li ankaŭ parolis pri bilanco (aktivo, pasivo),kiel kalkuli interezojn,maniero por kulturaj centroj organizi librotenadojn, slipojn aŭ simplajn kajerojn.
Tiu staĝo ebligis al la respondeculoj koni pli bone la librotenadon kaj administradon por funkciigi centrojn kaj federaciojn.

Laŭ raporto de C. Gérard.

Raporto pri la Unua Rodana Esperanto Rendevuo de L.F.Koop en Avignon (la 27an kaj 28an de Oktobro) Partoprenis tri infanoj kaj 49 plenkreskuloj. Inter la partoprenintoj -bonega surprizo- troviĝis Gaston Waringhien kaj György Nanovfszky. Tri grupoj funkciis en tri apartaj ĉambroj :-Grupo A (Perla Martinelli): la studa tempo estis dividata en partoj de 45 minutoj: tio ebligas daŭran atenton efikan. La malgranda nombro de partoprenintoj en tiu grupo (10) ebligis la efektivan partoprenon de ĉiuj. Ĉiuj alte taksis la kvaliton (logikon,riĉoplenon) de la proponita kurso kaj ĉefe la scion kaj la delikatecon de Perla.
Grupo B: (Giorgio Silfer). La temo de tiu kurso estis "gramatiko". Li ĉefe klarigis la tiklajn punktojn,laŭ petoj de la partoprenantoj. Inter aliaj,oni studis problemojn pri genro de antaŭnomoj,traduko de land- kaj urb-nomoj, antonimoj,verbaj formoj (u- kaj us-modoj,igi kaj iĝi,ata kaj ita),uzado de la artikolo. Entute la horoj pasigaj kun G. Silfer estis tre interesaj kaj riĉigaj (li estas 35 jara, de itala deveno,Doktoro pri modernaj lingvoj) kaj, inter aliaj, gajnis dufoje la ĉefan premion en la internaciaj floraj ludoj.
Grupo C: (Michel Duc Goninaz).Sabaton li prezentis duhore du mil jarojn de la slavlingva historio,skize,koncize sed trafe, enhavriĉe...Eniris niakapen la ĉefaj karakterizaĵoj de la slavaj lingvoj kaj la plej esenca en la rusa: la du aspektoj de la verba sistemo. Dimanĉon,plej alloga prezento de la influo de la slavaj lingvoj sur E-o. Tagmeza malsato haltigis tiun streĉe atentokaptan,cerbumadvekan konferecon.

Laŭ raportoj de "Esperanto Vaucluse" kaj la grupo de Nimes.



Letero el Nimo -2

Ex oriente lux.
(Mi provas latinumi kvankam pri latino mi estas tute malklera -ĉar,diris la nima poeto Jean Reboul, "la Nimano estas duone Romano"). Ferminte tiun parentezon, mi venas al mia hodiaùa temo.

Mia unua letero finiĝis per jena konkludo en formo de demando :"ĉu ni,nimaj esperantistoj, ni devus honti?" Honti pri la mizera rezulto de nia propagando. Eble mi devus anstataùigi "nimaj" per "francaj", eble eĉ per "eùropaj".

En la jardeko 1905-1914 floris la t.n. "franca periodo" de la movado. Tiam la plimultaj el la "eminentuloj" estis francaj. En ĉiuj francaj urboj la SFPE* havis aktivajn grupojn.Fakte tiu "aktiveco" ofte konsistis el festoj,festenoj,dancoj kaj krokodilaj babiladoj pri la "kara lingvo" ol el praktika uzado de ĝi. Sed ni estis videblaj,oni sciis pri nia ekzisto, oni parolis pri la lingvo internacia. En parizaj stacidomoj estis paneloj kun informoj en esperanto. En kioskoj estis vendataj niaj gazetoj, en montrofenestroj de librobutikoj oni vidis librojn pri kaj en esperanto. Iniciatoj kiel la konkurso por junaj esperantistoj premiita de fratoj Michelin, la fama pneù-fabrikistoj,diskonigis tra vasta publiko la nomon de Esperanto.

Kaj nun? Nun sendube kreskis la nombro de la seriozaj pratikantoj,ne plu simplaj esperantanoj sed veraj esperantistoj laù la distingo de Lanti. Tion ni scias,sed krom ni,kiu scias tion? Kiu scias pri la etoso de niaj kongresoj,pri nia gazetaro,pri la riĉeco de nia literaturo? Kiu scias, ke funkcias kursoj, ke por facile lerni la lingvon ekzistas modernaj rimedoj : libroj,diskoj,kasedoj? Kiu ekster niaj rondoj scias,kio ni estas, kaj kion ni povas alporti al niaj proksimuloj? Ni ignoras la mondon ekster nia mikrokosmo, kaj reciproke la mondo ignoras nin.

Tro ofte, parolante al laikoj,ni aùdas la respondon de S-ino Margaret Thatcher: "Esperanto? Bela revo,ja - domaĝe,ke ĝi fiaskis..." Opinio tre disvastigita. Kion ni faras por ĝin korekti? Escepte de kelkaj laùdindaj iniciatoj,ni kaùras en dormema aparteco,inter ni en fermita cirkvito,sen malfermo al la ekstero. Ni laboras kvazaù kaŝe,kiel sekreta societo aù kiel persekuta sekto rifuĝanta en katakombo. Kion ni faras por informi la nesciantojn kaj varbi novajn adeptojn? Ĉu paroli ankoraù pri "movado"? Tiu stagnado ŝajne ne estas speciala al nia urbo,al nia regiono,al nia lando,sed al la tuta okcidenta Eùropo (eble iom malpli al orienta?)

Dume la movado kredeble pli bonfartas en foraj landoj :Japanio,Koreio,Vjietnamio, kaj en Ĉinio la esperantistaro progresas en fulma rapido. Mi kredas,ke ni havas multon por lerni de niaj aziaj samideanoj. Kiel lumturojn brilantaj en malproksimo, ili montras al ni la vojon. Kiel profiti de ilia sperto,kiel kapti la sekreton de ilia skceso,kaj imiti ilian ekzemplon? Ĉu ne peti de ili la helpon de konsiloj? Jen estas demandoj,kiujn ni devas meti al ni mem kaj solvi,se ni ne volas,ke nia progresado daùre lamu en senkuraĝige malrapida ritmo.

Valo.

*SFPE : Société Française pour la propagation de l'Esperanto.

*******************************

<u>Ĉies tribuno</u>:

Valo levis gravajn problemojn en siaj du leteroj (sekvos aliaj).
Ĉu ni ne kulpas pri la nescio de la ĝenerala publiko koncerne Esperanton?
Dum la "foiroj de la asocioj" ofte venis la rimarkoj:"Mi neniam aùdis pri Esperanto...", "Kio estas Esperanto?", "ĉu ĝi ankoraù vivas" kaj similaj.
Fakte ne estas ĉiam facile aperigi artikolojn pri la Internacia lingvo en la gazetaro. Kiam ni sukcesas, foje venas demandoj (ĝuste, sekve de anonceto,la grupo de Nîmo varbis novan Esperantistinon),sed ankaù foje ne venas la plej eta eño. Ĉu ne ekzistas ankaù psikologiaj kialoj? <u>Viajn spertojn kaj rimarkojn ni volonte aperigos</u>. Ne forgesu,ke via bulteno estas ankaù via esprimilo. Valo almenaù pravas,laù mi, en tio, ke ni tro ofte "Konklavas" kaj ne estas videblaj. Ĉu ni hontas pri Esperanto? Ĉu sufiĉas ĝui Esperanton private?

J.H.

Nekrologio - Forpasis en PERPIGNAN, Johano LLECH, frato de nia Honorprezidanto René Llech-Walter. Li estis kunfondinto, en 1930, de la Federacio Langvedoko-Rusiljono. Nian sinceran kondolencon al la familio.

Anonco Nova Esperanto-tendumejo en la Sudaj Alpoj
Kontakti: S-inon Lucette LACOSTE -Trescléoux 05700 SERRES

Vintro-ferioj en Francaj Alpoj - BOURG-St-MAURICE 27 XII - 3 I kaj 3 I - 10 I
Dumtage skiado, skimigrado, promenado, feriado - Vespere riĉa Esperanto-programo (prelegoj, diskutoj, kursoj) -
Loĝejoj: apartamentoj malmulte kostaj
Informas: BAVELO -KolpingStr. 8, D 7790 MESSKIRCH

Prelegvojaĝo D-ro Istvan Gether vizitis nian Federacion, laŭdire lia prelego pri socio-politika ekonomio estis interesa kaj bon nivela. Li respondis demandojn de la ĉeestantoj. (Kiu sendos raporton?)

ALVOKO al la GEINSTRUISTOJ

GEE (Grupo de Esperantistaj Edukistoj) nombras 280 membrojn (14 en nia federacio). Tio signifas 280 homojn instruantajn aŭ instruintajn profesie en la kadro de la Nacia Edukado. Lastjare nur trideko da kursoj en la lernejoj estis listigitaj (4 en nia federacio). Instruistoj de lernejoj, mezlernejoj, liceoj, ne forgesu informi pri viaj kursoj!
Pri la eksperimentoj, kiuj disvolviĝas en pluraj landoj, estas detalaj klarigoj en IPR (Internacia Pedagogia Revuo), organo de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj instruistoj), abonebla pere de GEE- CCP 1018-02 W Toulouse (50F).
Dum la Internacia Renkonto de Infanoj en Grésillon (vd paĝon 2an) estos organizataj specialaj kunvenoj por instruistoj.
La venontjara renkontiĝo de ICEM (Movado Freinet) okazos en Jugoslavio en mirinde agrabla kadro...

==========================================

La Franca Esperanto-Instituto komunikas
sukcesintoj al:
atesto pri lernado: BELIN Christian (B) CATTIN Roselyne, ROQUES Andrée, SEVERA Louise (SB), TOURON Paul, VERLAGUET Claire
Atesto pri praktika lernado: BELIN Christian (B), TOURON Paul
Gratulojn al ili kaj al aliaj kursgvidant(in)oj.
Kiu nun provos la ateston pri kapableco?

## Se vi ĉeestus ...

Ni ŝatas esti inter ni. Almenaŭ dum kelkaj tagoj ni klopodas krei ĉirkaŭ ni iluzion pri vera ekzisto de Esperanto-komunumo.

Trankvila turisma urbeto Sète en la suda Francio gastigis ĉi-septembre la 7-an Internacian Semajnon ĉe Mediteraneo. Kvardeko da esperantistoj pasigis komune la semajnon. Kvankam la partoprenantoj ĉefe estis francoj, ne mankis iom da internacia etoso. Plaĉo de mediteraneaj plaĝoj ne malhelpis al lingvolernado: oni sekvis 3-nivelajn kursojn. Aliaj horoj liberis por kunestado. Al vesperaj programoj eblis kontribui per sia propra kreivo.

La aranĝo ripetiĝos septembromeze ankaŭ en 1985. Sekvu la informon en kalendaroj de Esperanto-eventoj. Se vi ĉeestus, eble ĝi aspektus iom aliel: kiel pluraj renkontiĝoj ankaŭ tiu ĉi enhavas tion, kion ni alportas al ĝi. Do, alportu foje vin mem!

**Spomenka Štimec**

*S F S*
*deziras al siaj legantoj*
*bonegan jaron 1985*

